

Literaturo

- LARKIN P.J. & SCOWCROFT W.R. (1981). *Somaclonal variation a new source of variability from cell cultures for plant improvement*. TAG, 60 (4), 197-214.
- GAPONENKO A.K., ŜAJAHMETOV I.F. & BABAËVA S.A. (...). *Analiz izofermentnogo sostava esterazy ADG, GDG et GOT somaklonov tvjorjodj i mijagkoj pŝenicy*. Genetika, 29 (2) 323-328.
- HILBERT K.A. & GREEN S.E. (1992). Inheritance and expression of lysine plus treonine resistance selected in maize tissue culture. Proc. Nat. Acad. Sci., USA, 559-563.
- WAIHASA D. & WINHOLM J. (1987). A methyltryptophan resistant rice mutant, MTRI, selected in tissue culture. TAG, 74, 49-54.
- ŜAJAHMETOV I.F., SURINA O.B. & MULJUKOVA G.H. (1995/96). *Poluĉenie hozjaistvenno-cennyh somaklonov jarovoj pŝenicy iz kultury kalusnov tkani. Itogi nauĉnyh issledovanij biol. fak-ta za 1995 god, Ifa, izdatelstvo BGU, 1996, pp 5-7*
- BEBJAKIN V.M. & EREMENKO L. V. (1999). Reologiĉeskie svojstva testa u somaklonalnih linij jarovoj mijagkoj pŝenicy. Doklady RASHN, 5, 3-5.

Adreso de la aŭtoro(j)

Dr. S. LEONOVA / DR. I. ŜAJAHMETOV
ul. Bluhera 6, kv. 22
RUS - 450075 - Ufa - 75
RUSIO

Priaŭtoro informo

Ambaŭ, S. Leonova kaj kunaŭtoro I. Ŝajahmetov, estas doktoroj pri natursciencoj en la urbo Ufa, Baŝkirio, Rusio.

Kial studentoj lernu Esperanton*

Ignat Florian BOCIORT

Enkonduko

Nuntempe jam kelkaj politikistoj, sciencistoj, intelektuloj ĝenerale kaj aliaj konsciaj homoj, atente rigardante la hodiaŭajn politikajn eventojn kaj ties sekvojn, troviĝas antaŭ nova kaj tre serioza demando: kiel komunikos la diverslingvanoj en Eŭropa Unio, eble ankaŭ en aliaj partoj de la terglobo en la nova mondo pli aŭ malpli dezirinde globaliziĝa? La plej simpla, logika demokratia respondo estus: la homoj komuniku inter si **en internacia lingvo**. Tamen, jam *Immanuel Kant* (1724-1804) menciis, ke la "pura racio" (*die reine Vernunft*) ne ĉiam koincidas kun la historia racio, plurfaktore determinita. Nia hodiaŭa respondo estu do, por esti realista, pli fleksebla.

La obstaklo en la komunikado inter diverslingvanoj estis ĉiam evidenta samkiel ties negativaj sekvoj. Respondon proponis ne nur malnovaj utopiistoj sed ankaŭ modernaj filozofoj kaj humanistoj. Hodiaŭ la problemo postulas neprokrasteblan solvon, kiu estu kaj racia kaj konkret-historia. Al tiu solvo ni ĉiuj estas rekte interesitaj.

Studenta potencialo kaj homaj ideologioj

Sed kia estu tia solvo? La hodiaŭaj gestudentoj, t.e. la morgaŭaj gvidantoj de la sociaj sistemoj, estas certe socia tavolo tre interesita al ne hazarda, sed al atente elpensita solvo: ĉar ili proprasperte perceptos morgaŭ ĉu la favorajn ĉu la gravajn damaĝojn de la niatempa solvo. Ili estas jam sufiĉe preparitaj per iliaj spertoj kaj konoj por atente, responsece analizi la fenomenon, kaj horizonte malfermitaj al novaj ideoj kontraŭstarantaj al diversaj antaŭjuĝoj.

Estante formiĝantaj sciencistoj, ili jam povas senti profesian respondecon pri la vero kaj justo en la ĉirkaŭanta medio, ili povas digne

* *Sintezo de 3-hora renkontiĝo (prelego kaj diskuto) okazinta la 4an de marto 2001 en Tefinika Universitato Berlino - Grupo Esperanto*

respondi al la devoj de la scienca etiko, firme zorgi pri la destino de novaj kaj validaj ideoj en nia epoko.

Viaj profesoroj laŭdas antaŭ vi la kuraĝon de mezepokaj sciencistoj, kiuj defendis la veron spite al minacoj de la inkvizicio, sed kion ni faras hodiaŭ por defendi la veraĵojn de nia epoko? Bedaŭrinde ne malofte la sinteno de niaj kleraj samtempuloj similas al tiuj de la mezepokaj kardinaloj kaj rutinulaj universitatoj: ĉu la tero turniĝas? Neeble! Birdo ekfluganta de sia nesto neniam retrovus ĝin! Nek la Biblio nek Aristotelo, la "senerara magistro", asertis tiun turniĝon de la tero aŭ ties rondiron ĉirkaŭ la suno!

Nu, Galileo pruvis la falsecon de iu aristotela instruo, nome, ke objekto havanta pli grandan pezon falas teren pli rapide ol objekto malpli peza: li faris **konkretan**, de ĉiuj videblan eksperimenton, faligante de sur la turo de Pisa du pezilojn, unu de kvin funtoj, alia de dek - kaj jen, ambaŭ falis teren samrapide. Tamen, en la universitatoj oni instruis plue, kelke da tempo, la aristotelan falsan teorion.

Vi eble legis librojn pri **la historio de la homa stulteco**. En tiuj libroj oni povas vidi, ke ĉiuj novaj ideoj devis batali kontraŭ antaŭjuĝoj, ke tiuj stultaj antaŭjuĝoj preparis dolorigajn fortostreĉojn al kuraĝaj sciencistoj. Tamen, kiom da iamaj "utopioj" nuntempe jam realiĝis! La kulturteorio venis al la konkludo, ke iam oni povus realigi ĉion, kion iu hodiaŭ kapablas pensi; tamen la homoj ne sufiĉe lernas el sia historio. Iu filozofo eĉ asertis, ke la sola instruo kiuj la historio donas estas tiu, ke la homoj ne lernas el sia historio. Bonvolu pripensi la diversflankajn avertojn de tiu eldiraĵo.

La hodiaŭa scienco antaŭ la lingva demando

Feliĉe, la hodiaŭa interlingvistiko jam analizis la sociologiajn, politikajn, ekonomiajn, psiko-pedagogiajn, historiajn, filozofiajn kaj kompreneblajn, lingvistikajn aspektojn de la **monda lingvoproblemo**, kies kompleksecon oni ne povas tuj kapti intuicie. La homa penso estas programita por reagi al ĉirkaŭantaj eventoj, sed ne al tro kompleksaj, tro grandaj (aŭ tro malgrandaj), do ne al **tutmondaj procezoj**.

Ni aldonu, ke la **spiritaj** fenomenoj ne estas tuj pruveblaj per faligo de peziloj, per antaŭeniro de lokomotivo aŭ per flugado de avia dilo. Necesas ĉi tie logika demonstracio, observado de faktoj, analizo

destinoj, de la ideologiaj konfuzoj. La scienco devas defendi la validajn ideojn - kontraŭ la antaŭjuĝoj, kontraŭ tiuj, kiuj neas ilin interese, kiuj sincere kontraŭas ilin erarige aŭ apogas ilin per falsaj argumentoj.

Por tiaj ŝarĝoj neniu estas "denaska" kompetentulo. Estas la unua devo de la scienco, de la intelektularo ĝenerale, klarigi la problemojn, almenaŭ ĝis la limo de la nunaj konoj, kaj serĉi solvojn trans tiu limo. Ĝuste tion proponis al si diversaj forumoj nuntempaj, okazantaj ĉu dum la Mondaj Kongresoj de Universala Esperanto Asocio ĉu aliloke.

En novembro 2000, la *Société Internationale de Linguistique Fonctionnelle* (Internacia Societo por Funkcia Lingvistiko) anoncis sian XXV-an kolokvon, okazonta en *Frankfurt/Oder* inter la 4a kaj la 8a de aprilo 2001, kaj invitis la lingvistojn de la Sekcio I (Lingva Politiko) proponi respondojn al jenaj demandoj:

- Kiel komunikos la diverslingvanoj en Eŭropa Unio?
- Ĉu Eŭropo povas kontentiĝi per unu sola vehikla lingvo, la angla?
- Kiuj estos la konsekvencoj por la ceteraj lingvoj?
- Kiu alternativo al la angla?

Mi revenos al tiu ĉi scienca aranĝo. Ĉi-momente interesas la fakto, ke finfine tre seriozaj sciencaj aranĝoj ĉiam pli trafe metas sur la tagordon la problemon de la **interkomunikado**. La diskutoj de la fakuloj ne povas resti fremdaj al la gestudentoj ĉiufakaj.

Supre mi menciis diversajn fakajn perspektivojn, kiujn observas kaj pretendas al la ĝenerala publiko nova scienco-branĉo, t.e. interlingvistiko. Ni ne diskutos hodiaŭ funde tiujn aspektojn, al kiuj estis jam dediĉitaj ampleksaj bibliografioj (1). Tamen la motivo de okupigo pri Esperanto kaj la lernado de la lingvo, precipe fare de gestudentoj, postulas kelkajn ideojn pruntitajn de la diversaj sciencoj, ĉar tiuj ideoj apartenas al nia morala kaj intelekta preparo.

Antaŭ pli ol 40 jaroj, konata rumana matematikisto akademiano *G. Moisil* (1910-1976) estis aŭskultinta japanan matematikiston prelegante en Esperanto dum iu matematika kongreso. Por *Moisil*, kiu estis kreanto de kelkaj novaj esplordirektoj en matematiko (inkluzive en la matematika lingvistiko) Esperanto tuj aperis en siaj grandaj dimensioj. Kvankam tiutempe en Rumanio Esperanto estis oficiale malpermesita, *Moisil* donis intervuon, en kiu li klare asertis: "La ge-

studentoj devas lerni Esperanton." Li aldonis pro tio kelkajn kialojn intuicie esprimantaj la konvinkon de granda spirito, ke temas pri grava afero malmulte komprenata eĉ de iuj lingvistoj.

En la Esperantoliteraturo vi povis trovi hodiaŭ multajn asertojn de sciencistoj favore al Esperanto (2). Tamen, lastatempe oni povas legi artikolojn, en kiuj la aŭtoroj demandas sin: "Kial la homoj **ne volas Esperanton**". La tri aŭ kvar aŭtoroj de tiaj skribaĵoj eble ne estas "denaskaj pesimistoj" kaj defetistoj. Al ili mankas nur la kulturhistoria perspektivo kaj la scienca rigoreco en kelkaj esencaj konsideroj.

Oni povas facile imagi, kiom tiaj negativaj sintenoj parte de Esperanto-parolantoj helpas al la kontraŭuloj de Esperanto - en epoko de daŭraj kontaktoj de UEA kaj de aliaj organizaĵoj kaj unuopuloj kun internaciaj instancoj cele de enkonduko Esperanto internaciskale per oficialaj naciaj kaj internaciaj forumoj. Des pli aktualas la demando **kial la gestudentoj** - la morgaŭaj multiplikantoj de la ideoj en la socio - **lernu Esperanton**, spite al iuj funebraj aŭguristoj.

Estonte mi certe okupiĝos atente pri la ideoj de tiaj sociaj nekroforoj (3). Ĉi tie mi nur demandu la pesimistojn, kial do la homoj "ne volas" vivi racion vivon, sen fumado, drinkado, tro da grasajoj kaj streso? Kial la homoj "ne volas" vivi en paco, konservi la naturon k.t.p.? **Ĉu pro tio kulpas la ideoj?** Ĉu estas falsa la ideo, kiun la homoj ne tuj enkondukas en siajn vivojn? Ĉu ni rezignu pri la idealoj de paco, interpopola amikeco, egaleco inter la popoloj kaj aliaj nur tial, ĉar dum la jarcentoj aŭ jarmiloj ili ankoraŭ ne fariĝis realaĵoj?

Fakte sennombraj homaj celoj jam fariĝis realaĵoj - sed ne samtempe kaj ne rapide. Oni povus eĉ starigi sociologian principon: **Ju pli grava, pli granda, pli funda, pli kerna estas iu ideo, des pli malfacilas ties realiĝo.** Mi tuj aldonas, ke ankaŭ Esperanto fariĝis realaĵo: vi mem kaj aliaj dekmiloj aŭ centmiloj da Esperantoparolantoj jam estas parto de tiu realaĵo, kvankam la dimensioj de nia movado, la forumoj utiligantaj Esperanton estas ankoraŭ malgrandaj.

Ĉu tio devus konduki al pesimismaj konkludoj?

Ĉiuj iniciatoj komencas per "12 apostoloj", pli bone dirite per unu aŭ du personoj. Ni ankaŭ ne forgesu, ke dum sia tuta 114-jara historio Esperanto devis alfronti multajn kaj malnovajn antaŭjuĝojn, politikajn, ekonomiajn, hegemoniajn interesojn, ideologiajn (faŝismajn, stalinismajn k.s.) stultaĵojn, malpermesojn kaj persekutojn. Al arme-

aj kaj financaj kolosoj ĝi povis nur kontraŭstari kiel pura kaj nobla ideo. Nu, malaperis multaj ĝiaj kontraŭuloj, fortaj kaj fieraj, sed Esperanto vivas. Kial ĝi ne rapide progresis? Respondon donas la libro de *Ulrich Lins* "La danĝera lingvo" (3) kaj oni komprenas, ke infano, kies piedojn jam eĉ naskiĝo oni kunligis, ne kulpas, se post iom da jaroj ĝi ne kapablas rapide iri.

Tiaj konsideroj apartenas al la sciencoj (historio, kulturologio k.s.) kaj devas flori kaj frukti en la sinceraj animoj de la junularo, por ke tiuj animoj klare vidu la racion, la sencon de propra pasia engaĝiĝo. **La valideco de principa argumentado mobilizas la karakterojn**

Jam delonge la historio de la kulturo montras, ke la grandaj ideoj **unuiĝas** kun la **personecoj** de la homaro; la **karakterojn oni ne necesas aĉeti por servi idealojn**. Grandbarba ekonomiisto kaj filozofa Karlo Markso asertis: Se la homaro metas al si iun ŝarĝon, tio signifas, ke venis aŭ jam prepariĝas la kondiĉoj por realigi ĝin. Nu, sciante, historiaj ŝarĝoj trovas ankaŭ la karakterojn pretajn engaĝiĝi en realigo de la novaj ideoj kaj idealoj. Propredirite la idealoj pli **kreas** ol "trovas" la karakterojn. Idealoj estas estontecaj projekcioj, bildoj ĉarmaj, aperemaj-malaperemaj, de niaj deziroj, de nia plej pura kaj sana konscienco, tial ili kaptis la korojn kaj mensojn de Konfuceo, de Jesuo, de multaj aliaj "revantoj", ĝis Gandio, Zamenhofo kaj ĝis nun multaj apostoloj, modestaj, silentemaj, de la nuntempaj humanistaj movadoj. Gravas ĝuste por la junularo la fakto, ke **idealaj kreskigas la karakterojn** ĉar ili mobilizas la fortojn de la homo, vekas ilin, orientigas ilin al gravaj celoj kaj tiele savas ilin de fipensoj kaj sendignaj faroj, eltiras ilin el kontraŭsociaj medioj ktp. Tial, **la valoro de la homo estas konekta al la morala valoro de siaj idealoj.**

Bedaŭrinde nuntempe, miaopinie, sur la unua kaj plej digna loko en la lernejoj de ĉiuj al mi konataj landoj staras la transdono de informacioj, ne la **formado de karakteroj**, kvankam tiom da geniaj personecoj, ekde grandaj antikvaj aŭtoroj de moralaj skoloj ĝis Kanto (1724-1804), Ŝilero (1759-1805) kaj la pedagogoj de nia epoko arde postulas tion kaj avertas pri la negativaj konsekvencoj de senkarakteraj homoj kun alta kvalifiko kaj sociaj gravaj funkcioj. Tiu ĉi ampleksa parentezo celas, plifortigi vian konvinkon, ke spontane venintaj al Esperanto vi faris gravan paŝon en validan direkton - eĉ se vi kaj ni ĉiuj ne povas konscii pri la fakte senfinaj sociaj sekvoj de internacia lingvo. Ni fakte ne povas "ĝisfine" argumenti por Esperanto.

Ni do troviĝas en la situacio, kiun prezentas en sia romano "Sub la jugo" la granda bulgara verkisto *Ivan Vazov* (1850-1921): juna, grandanima instruisto, sincere ligita al sia popolo, vojaĝas de urbo al vilaĝoj por senpage instrui la kamparanojn legi kaj skribi, sed li ĉagreniĝas, ĉar li ne povas sufiĉe argumenti al la homoj, kial ili alproprigu al si la kapablon legi kaj skribi! Ankaŭ ni, hodiaŭ, ne povus "ĝisfine" montri la konsekvencojn de alfabetizado. Tio estas klarigebbla per la sistemteoria kaj informacia tezo, ke **la konsekvencoj de ĉiu ago estas sennombraj, senfinaj**. Ĉu iu povas montri "ĝisfine" la konsekvencojn de la malkovro de Ameriko? Aŭ de rompo de unu sia fingro? Konklude, ankaŭ al la demando, kial lerni Esperanton oni ne povas respondi per "saĝa pilolo". Tamen, iujn fenomenojn ni devas percepti, analizi, pripensi, ĉar lernado de Esperanto tute ne estas memkompreneblajo.

La konfuzoj pligrandiĝas hodiaŭ, kiam la angla lingvo akiris preskaŭ hegemonian pozicion internaciskale kaj la sinusaj evoluoj de Esperanto ŝajnas dubigi iujn pri la perspektivo de nia lingvo. Ĝuste tial nuntempe ege gravas la klareco de niaj pozicioj. Do anstataŭ listigi 1 - 2 - 3 - 4 ĝis n kialojn, por kiuj la gestudentoj lernu Esperanton, prefere ni rigardu de proksime kelkajn fenomenojn de la nuna kulturo, en la nuna lingva ordo de la internacia vivo. Ekzemple ni rigardu la situaciojn de simplaj homoj, de la intelektuloj, la interhomajn rilatojn de diverslingvanoj, la interŝtatajn rilatojn kaj kelkajn instruojn de la kulturhistorio.

Kial do Esperanto estas tiom grava?

1. Por simplaj civitanoj de la landoj

La nekapablo komuniki kun alilandanoj kaj kompreni eksterlandajn ĵurnalojn kaj revuojn estas, en nia epoko, **psika handikapo kaj sento de malplivaloreco**. Ni tuj aldonu, ke tio ne validas por la civitanoj de landoj, kies lingvoj validas pli aŭ malpli internacie. La nekapablo komuniki kun alilandanoj kaj kompreni eksterlandajn ĵurnalojn kaj revuojn estas, en nia epoko, **psika handikapo kaj sento de malplivaloreco**. (Ni tuj aldonu, ke tio ne validas por la civitanoj de landoj, kies lingvoj validas pli aŭ malpli internacie.)

Tamen, en ĉiuj landoj de la mondo la simplaj homoj faras fizikan, malfacilan, ofte malmulte profitodonan laboron, kiu ne lasas tempon kaj fortojn, nek permesas la rimedojn, por studi (eble eksterlande)

fremdajn lingvojn. Mankas ankaŭ la alkitimiĝo al intelekta, malfacila laboro aŭ la talento por tiaspeca agado, ĉar dum la infanaĝo ili ne havis guverniston kaj privatajn instruistojn por lerni diversajn lingvojn. Miliardoj da homoj troviĝas en tiu ĉi situacio. Ĉu ne estas demokratie akcepti, ke ankaŭ ili rajtas komuniki? Multaj ja povus turismi. Sed dum turismaj vojaĝoj ili vidas kaj komprenas malpli ol kiam ili hejme rigardas televidon. **Fakte la regado de fremdaj lingvoj estas hodiaŭ ĉie apanaĝo de maldika tavolo de intelektuloj** (esploristoj, profesoroj, ĵurnalistoj, verkistoj).

Ĉu la popolamasoj lernu "facile jam kiel infanoj" fremdajn lingvojn? Tio spegulas **kolonialisman mentalecon de personoj neniam serioze lernintaj fremdajn lingvojn** kaj ne konscias, ke temas pri ege malfacila ŝarĝo, senfina kaj stresiga, postulanta multege da tempo, da fortoj, rezignon pri libertempo, pri ludoj kaj sportoj. Kaj **kiom pagas la ŝtatoj pro tiu laboro?** Kiuj ŝtatoj? Ne la riĉaj kaj fortaj, **lingve privilegiitaj**, ekz. Britio kaj Usono, ĉar **ili scias kalkuli**, do ili ne multe interesiĝas pri fremdaj lingvoj: **ties civitanoj ne estas poliglotoj**. Iu brita kulturministro antaŭ kelkaj jaroj publike esprimis **la esperon, ke baldaŭ la gejunuloj de Britio ne plu devos lerni fremdajn lingvojn!** Vere, lernado de lingvoj ne estas en si mem profitodona okupiĝo kaj ĉiukaze la rezultoj estas dubindaj: jam la lernado de la gepatra lingvo estas notinde malfacila ŝarĝo.

Profesoro *Martinet* el Pariza Universitato avertis, ke je la demando "kiom da lingvoj vi regas?" la filologoj (homoj konsciaj kion signifas **regi lingvon**), devas respondi: "Unu solan mi regas, kaj tiun tre malbone: la gepatran". Ni aldonu, ke la infanoj en metropolo (kun televido, kulturaj ofte fremdlingvaj spektakloj k.t.p.) povas havi pli da intereso lerni la anglan ol la imensa parto de infanaro vivanta en vilaĝoj, interesita pri kulturo de tereno, de abeloj, de bestoj, dum fremdaj lingvoj estas por ili sensenca okupiĝo; kelkfoje la instruistino mem ne kapablas konversacii en la lingvo, kiun ŝi instruas! Precipe se la lernota lingvo apartenas al alia lingvo-familio (ekz. la germanoj "lernintaj" la rusan). La rezultoj estas mizeraj.

2. Por la intelektuloj

Mi ŝatus demandi kuracistojn, psikologojn, filozofojn, historiistojn, biologojn, filologojn: **kiam** ili komencis lerni fremdajn lingvojn kaj **kiam** ili komencis lerni la problemojn de la propra fako, poste dem-

andĉi la fakulojn ĉu ili konscias, ke la lingvoj forrabis kvinoble ĝis dekoble (aŭ pli) da tempo, da energio - ofte ankaŭ da mono - ol la studado de la propra fako. Sed, denove, la gejunuloj de iuj riĉaj landoj, unue de anglalingvaj, ne elspezis siajn junajn jarojn por lerni la nomojn de plantoj, birdoj, insektoj k.t.p. en aliaj lingvoj, sed ili studis la naturon, la socion, doktoriĝis, esploris tre frue gravajn temojn biologiajn, medicinajn.

Alia aspekto: lerni lingvojn ne egalas al konstrui meblojn aŭ maŝinojn, do krei **objektojn** longe daŭrajn, eble utilaj ankaŭ por la posteuloj. La lingvo estas **informacio**, kaj tiu ĉi perdiĝas spontane pro la entropiaj leĝoj de la universo, do post kelkaj jaroj, en kiu la junulo ne daŭre okupiĝas pri la "lernataj" lingvaj konoj, tiuj konoj perdiĝas - kune kun la uzitaj tempo kaj forto.

Tamen ni akceptu, ke iu tre kapabla junulo, diligenta kaj ambicia, lernis du aŭ tri fremdajn lingvojn, povas legi aŭ konversaci en du lingvoj kaj verki en la tria - precipe se li estas matematikisto, fizikisto aŭ ĥemiisto, ĉar tiuj fakoj bezonas malmulte da vortoj kaj nur kelkajn stereotipojn.

Mi pretas laŭdi junan kuraciston kiu bonege parolas fremdajn lingvojn, ĉar la socio ne estas interesita, ke li konu du ĝis trimil vortojn alilingvajn, sed **ke li elstare konu sian fakon**. Ĉu li havis tempon por studi la medicinajn ideojn, sugestojn, supozojn ekde Hipokrato kaj Galeno ĝis hodiaŭ, la sennombrajn empiriajn spertojn de la diversaj popoloj, la fakajn atingojn de la moderna epoko, la principojn kaj rezultojn de "najbaraj" aŭ "parencaj" fakoj?

Ĉirkaŭ 20 000 malsanoj estas nesufiĉe studataj, ni ofte renkontas en medicinaj studoj la aserton: "La kaŭzoj de tiu malsano estas nekonataj". Do **niaj kapablaj gejunuloj bezonus ne unu sed plurajn vivojn por prepariĝi funde kiel fakuloj** kaj studi la nekonatajn problemojn de **siaj fakoj**. Ĉu ni povas postuli, ke la homoj unue fariĝu poliglotoj kaj samtempe elstaraj fakuloj? Certe, oni povus supozi, ke la problemoj estas solveblaj per unu sola nacia lingvo - nome per la angla. Sed la **disvastiĝo de la angla montras nur la fakton, ke la problemoj de internacia komunikado serĉas solvon, sendepende de tio, ĉu la nuna solvo estas optima aŭ ne**.

Precipe la komputilistoj havas la impreson, ke la angla jam solvas la problemon, sed por la fakuloj de la spiritaj sciencoj kaj por la cetera homaro la problemoj ne estas solveblaj per iu nacia lingvo, ĉiam

ege komplika, ĉiam alportanta hegemonion de sia ŝtato kaj marĝenigon, senvalorigon de la ceteraj lingvoj kaj kulturoj. En internaciaj kongresoj la diskutoj estas monopolo de tiuj, kiuj havas siajn denaskajn lingvojn kiel "kongreslingvojn" aŭ "laborlingvojn", aŭ de tiuj, kiuj havis dum multaj junaj jaroj la eblecon lerni en eksterlando aŭ private tiujn lingvojn. La ceteraj partoprenantoj legas tekstojn tradukitajn antaŭe, ili malofte havas egalajn ŝancojn defendi la interesojn, kiujn ili reprezentas. Do, **samtempe kun la fiksado de "laborlingvoj" jam naskiĝis diskriminacia situacio por granda parto de la ĉeestantaj fakuloj**.

Ni plue observu ekzemple la destinon de du sciencaj libroj - ni diru unu hungarlingva, la alia anglalingva. Eble la hungara estas pli bona, sed tamen kio okazas? La hungara aperis en ducent ekzempleroj, la angla en centmil ekzempleroj, kiuj estas dissendataj en ĉiujn landojn, tie oni tuj aĉetas ĝin, oni studas ĝin en originala versio, oni komentas kaj popularigas ĝin, do la aŭtoro kaj sia ŝtato tuj profitas ĉiurilate. La alia libro, la hungara, restas nur latentaj, potenciala valoro por la fakuloj, kiuj tute ne komprenas ĝin; la traduko estus ege multekosta, la cirkulado de la libro multe prokrastiĝas, ĝia informacio intertempe malaktualiĝas.

Do malsupera libro povas venki superan per la lingvo en kiu ĝi estis skribita! Sekvo: la aŭtoroj emas aperigi siajn librojn en la angla, do ili rezignas alparoli la propran popolon kaj pliriĉigi propran kulturon, ili pliriĉigas la anglan kulturon. Oni povas rimarki, ke jam la bibliografio de sciencaj laboraĵoj estas ĉiam pli ofte kvazaŭ nur en unu aŭ du lingvoj, precipe en la angla, do la sciencistoj de la cetera mondo kvazaŭ malaperis, liaj pensoj perdiĝis se ili uzis siajn diskriminacitajn propranaciajn lingvojn.

Restas nur, ke post iom da tempo oni proklamu la **malrespekton por ĉiam pli multaj lingvoj kaj kulturoj kaj la triumfon de ĉiam pli malmultaj lingvoj kaj kulturoj**, ĝis, finfine, la "venko" de unu sola lingvo. Espereble tia apokalipsa profetaĵo de iuj futurologoj neniam realiĝos, tamen jam tiu ĉi profetaĵo estas indignaĵo, sed ĝi havas precedenton: en la 17-a jarcento, iu greka monaĥo postulis per proklamacio, ke la serboj, rumanoj, bulgarioj kaj albanoj, **konsciante pri la disvastiĝo de la nobla helena lingvo, rezignu pri siaj "primitivaj lingvoj" por fariĝi "puraj grekoj"!**

3. Por la interhomaj rilatoj de diverslingvanoj

Fakte la homaro dividiĝas en du kategoriojn: tiuj kiuj parolas nur la propran diskrimiciitan lingvon kaj tiuj, kiuj parolas la anglan. **Por esti egalaj kun la anglaparolantoj, la anoj de ĉirkaŭ 4000 ĝis 5000 lingvoj kaj dialektoj devas rezigni pri la propra lingvaĵo**, t.e. ili devas perdi sian naciecon, la specifecon de la propra kulturo. Kompreneble, temas ĉi tie (ankoraŭ) pri **tendenco**, kiu povas aŭ ne povas fariĝi realaĵo.

Ĉi-momente oni vidas nur, ke multaj etnaj lingvoj iĝas "provinciaj": ili estas "neutiligeblaj", nerespektataj, ĉar ili kapablas alporti nur malrespekton kaj **profesiajn malavantaĝojn** al siaj parolantoj. Tio kondukas ne al proklamita kultura policentrismo, sed kontraŭe, al malapero de la kultura diverseco de la homaro.

Oni ja ne povas ne rimarki la tendencon, ke la filmoj, la muziko, la viva stilmaniero k.t.p. fariĝas unulingvaj, unumentalecaj. Kelkaj landoj (Francio, Germanio, Italio ktp.) finfine iniciatis reagojn al tiu fenomeno, sed sen **nova solvo** la rimedoj estas nur "konservativaj": "uzu la gepatran lingvon, la naciajn vortojn kaj esprimojn" spegulas nur la deziron, konservi la specifecon de la popoloj, **sed ne respondas al la postuloj de la internacia nuntempa komunikado**, kiu estas hodiaŭ multe pli forta ol la jam ĉiam pli eksmodaj patrujaj sentoj.

Al tiu ĉi problemo donas respondon la kulturhistorio: Kiam en iu lando havis superecon la lingvo de alia popolo, la propra lingvo fariĝis malŝatata, malkonsiderata - ĉar la lingvo ne nur komunikas ideojn, ĝi havas plurajn aliajn funkciojn (ĝi donas sociajn poziciojn, prestiĝon, permesas tuŝi ankaŭ la animojn de la homoj kreante "filohispanojn", "filoanglojn", "filorusojn" ktp.)

Ekzemple, la latina, lingvo de la konkerantoj en antikveco, forrabis de dakoj, de galoj, de iberoj la proprajn lingvojn. Sed tiu fenomeno ne okazis dum la mezepoko, kiam la latina estis **nenies** gepatra lingvo, sed nur ilo por interkomunikado de okcidentaj sciencistoj! Konklude la reala solvo estas **neŭtrala lingvo**. Sed tia lingvo ne ekzistis; ĉiu lingvo apartenas al certa etnio. Do la problemoj kaj samtempe la grava ŝarĝo de la sciencistoj ne reduktiĝas al senefikaj lamentadoj pri la hegemonio de iu nacia lingvo.

La problemoj estas hodiaŭ, **antaŭenpuŝi la neŭtralan lingvon**. Pri tia solvo pensis jam *Comenius* (1596-1650), *Descartes* (1592-1670),

Leibniz (1696-1716), *Newton* (1693-1727) kaj aliaj filozofoj, sciencistoj, humanistoj. *Comenius* jam konceptis, ke tiu nova lingvo estu pli facila, ĉar la "naturaj komplikajoj ne estas necesaj, ĝi estu tre esprimpova, unuigante en sia strukturo la plej necesajn kaj "belajn florojn" de la etniaj lingvoj ktp. Nia ŝarĝo estas do **preterpasi la limojn de niaj kutimaj pensoj kaj kuraĝe analizi la avantaĝojn de neŭtrala solvo!**

4. La interŝtataj rilatoj

Fakte nuntempe certaj ŝtatoj eksportas lingvon kaj kulturon, dum la aliaj, **kvazaŭ ĉiuj**, importas tiajn "varojn" - sed ne ĉar la propraj lingvoj kaj kulturo estas senvaloraj, sed nur tial, ĉar iu(j) ŝtato(j) akiris hegemonian pozicion - ĉu per militoj kontraŭ la popoloj de Afriko, Azio, Ameriko, ĉu per ekonomiaj kaj financaj fortoj. **Ne la racio**, nek la demokratio, nek la verkoj de grandaj poetoj, dramistoj aŭ filozofoj disvastigis iujn lingvojn, sed la kolonialista soldato, la fajraj armiloj de konkistadoroj aŭ la morale tre dubindaj leĝoj de la merkato.

Oni parolas ankoraŭ pri "interŝanĝoj de valoroj", sed fakte la valoroj (ofte nevaloroj) havas nur unu direkton: de riĉaj landoj al malriĉaj, do tute ne en ambaŭ direktoj, laŭ sciencaj, estetikaj, moralaj kriterioj, ĉar la plej multaj landoj de la mondo tute ne troviĝas, el kultura vidpunkto, en situacio de "tria mondo". Tiun problemon ni ne diskutu ĉi tie, sed multaj spiritaj produktaĵoj ne nur de Francio, Germanio, Italio sed ankaŭ de la ceteraj eŭropaj, aziaj, amerikaj, afrikaj popoloj tute ne estas malsuperaj al tiuj, kiuj tre ofte, eble tro ofte venas el Usono. Ĝenerale dirite, la kreaĵoj de multaj popoloj estas gravaj kulturaj atingajoj, kiuj detruas nek la naturan nek la spiritan medion.

Ne senkiale la niatempa usona sociologo *Alwin Toffler* atentigas pri la grandeco kaj graveco de la antaŭkapitalistaj valoroj. Certe, ni ne revenu senkritike al tiuj valoroj, sed ni daŭrigu ties validajn tradiciojn; samtempe ni ne akceptu senkritike kaj blinde ĉiujn "modernajn" produktaĵojn. Por nia diskuto estas necese observi, ke per siaj lingvoj la grandaj kaj fortaj ŝtatoj ĉiam celas akiri "sferojn de influo", ĉar tio donas al ili ne nur kulturajn sed ankaŭ ekonomiajn, politikajn, ja strategiajn avantaĝojn. Sed tiuj celoj plifortigas la **spiriton de eblaj konfliktoj** kaj preparas la homojn, aparteni al unu aŭ alia "sfero de influo".

Per siaj riĉaĵoj iuj ŝtatoj kreas la situacion aŭ almenaŭ la impresojn, ke ĉio bona, ĉio sukcesa eblas nur en tiuj ŝtatoj, do ili altiras la intelektajn fortojn, la kapablajn gejunulojn el aliaj landoj, kie la studentoj estis lernintaj kaj fakajn objektojn kaj la fremdan lingvon - ĉion je la kostoj de siaj propraj landoj, kiuj elspezis por tiu kvalifikado miliardojn da dolaroj kaj sur la globo miliardojn da labortagoj. Konklude, la senkulpaĵ "modernaj lingvoj" fariĝas iloj por pligrandigi la neegalecon en la diversaj sferoj de la internacia vivo, ili fariĝas aneksaĵo de la hegemonia politiko en la mondo.

5. Iom da instruoj de kulturhistorio

Ĉu ni **kapablas** preterpasi la limojn de nia tradicia pensado rilate al lingva solvo de la nuntempaj provokoj? Neŭtrala lingvo povas esti hodiaŭ kreita lingvo, do "artefarita". (Ni ne diskutu ĉi tie aliajn nepraktikeblajn solvojn). La sincera deziro, solvi la problemon de lingva komunikado en la hodiaŭa mondo, trafas la haltopunkton kovritan de antaŭjuĝoj: "Ĉu artefarita lingvo?" - "Tio ja ne eblas!" - "La lingvoj estas nur naturaj aĵoj" - ktp. ktp. Brazila aŭtoro *Walter Francini* skribis antaŭ pli ol 30 jaroj, ke pli facile falos la Berlina muro ol la antaŭjuĝoj kontraŭ Esperanto! Kaj jen, li pravis!

La gravaj kvalitoj kaj funkcioj de Esperanto kuŝas ĝuste en ĝia "artefariteco"; ĝi evitas la senutilajn malregulecojn kaj komplikajojn de la etnaj lingvoj, ĉar tiuj komplikajoj originas en la hazardaj kontaktoj de la lingvoj, en iliaj historioj, kaj havas neniun rektan rilaton al esprimpoveco. Esperanto uzas la plej bonajn, plej raciajn, esprimovajn solvojn ekzistantajn en diversaj lingvo-familioj - precipe en la romanidaj, ĝermanaj, slavaj lingvoj - kaj tiun agadmodelon uzas ekzemple ĉiu inteligenta inĝeniero, kiu kreas novtipan maŝinon prenante la plej funkcian parametrojn de diversaj maŝintipoj; per tio, Esperanto fariĝis multe pli simpla, pli facile lernebla kaj utiligebla ol iu ajn etna lingvo.

Estante **neŭtrala lingvo**, ĝi kreas nediskriminacian etoson en la internaciaj kontaktoj de diverslingvanoj; estante **la sama** por la anoj de diversaj nacioj, ĝi permesas senperan kontakton, egalan ŝancon, egalan kaj amikan alireblecon al reciprokaj pensoj kaj sentoj. Ege gravas el pragmatika vidpunkto la fakto, ke Esperanto, post sia disvastiĝo, permesas rapidan fluon de informoj inter la popoloj kaj ŝparas miliardojn da laborhoroj, kiujn nuntempe la gejunuloj de la mondo mal-

ŝparas por lerni ne la lingvojn de la najbaroj, ne la lingvojn kiujn ili volas lerni, sed la lingvojn de la plej potenculoj aŭ riĉuloj, tamen sen solvi la problemon de komunikado per la nuna poligloto.

Se ĉino lernas la anglan, turko lernas, la francan, bulgaro lernas la rusan, ĉeĥo lernas la germanan, ili estas **kvar fakuloj kun ok lingvoj, sed ili ne povas komuniki**. Ni aldonu, ke la ideo, kiun Esperanto realigas kiel "lingvo farita el pluraj lingvoj", tute ne estas sen precedento en la kulturhistorio. Nur Zamenhofo, la kreinto de tiu ĉi projekto, iris pli malproksimen ol, ekzemple, *Dante Alighieri* (1265-1321), kiu kreis la italan kulturlingvon surbaze de pluraj dialektoj. Ankaŭ *Martin Luther* (1483-1546) uzis elementojn ĉeestintajn en pluraj ĝermanaj dialektoj same kiel la antikva Homero verkis siajn epopeojn surbaze de pluraj helenaj dialektoj. Kompreneble *kaj Homero kaj Danto kaj Lutero* prenis kiel bazon **un** dialekton.

En la multaj jardekoj post apero de Esperanto oni ofte neis, ke "artefarita lingvo" povos funkcii. Sed tiuj neadoj neniam apartenis al scienca pensmaniero, samkiel ne apartenis al scienca pensmaniero la aserto, ke la homo neniam elpaŝos sur la Lunon. Scienca pensmaniero rajtas nur aserti: "Ĉi-momente oni ne scias, ĉu la homo iom atingos la Lunon aŭ ne". Sekve, oni devintus nur diri: "Ni vidu, ĉu artefarita lingvo funkcias aŭ ne". Oni devintus memori, ke ĉiu ajn sistemo, ĉu biologia aŭ socia, se ĝi ricevas funkcion, kiun ĝi devas plenumi, ĝi perfektigis paŝon post paŝo por realigi supere la koncernen funkcion. Tiele perfektigis ĉiuj niaj organoj kaj samtempe pliboniĝis iliaj funkcioj.

Hodiaŭ la Esperanto-kulturo enhavas dekmilojn da verkoj ĉiufakaj. Do, prave konstatis la franca lingvisto *Meillet*: "Ĉiu diskuto estas senseca; Esperanto funkcias". Tamen, ekzistas ankoraŭ multaj samtempoj, kiuj "ne kredas" ke Esperanto povas funkcii kaj taŭgas kiel supera kulturo k.t.p. Ili ignoras, ke iam ĉiuj nunaj naciaj lingvoj estis neataj kiel eblaj iloj de supera kulturo.

Frederiko II-a de Prusio skribis en la franca, malkonsideris la germanan (lingvo, kiun li parolis "kun la ĉevaloj kaj kun veturigistoj"). En 1700, la filozofo *Christian Thomasius* estis eksigita el la universitato de *Leipzig* ĉar li "**kompromitis la sciencan per tio, ke li prelegis germanlingve, ne latinlingve**, kiel oni faris tiutempe.

Ankaŭ la franca estis neata ĝis *Ronsard* (1524-1585), la itala ĝis *Dante*, la rusa ĝis *Lomonosov* (1711-1765). Plurajn jarcentojn la

Biblio devis esti tradukita nur en la hebrean, helenan kaj latinan, poste ankaŭ en la malnovslavan (4) - **ĉar la ceteraj lingvoj estis konsiderataj nedignaj por komuniki sanktan tekston.** Sed ankaŭ la latinlingvaj prozistoj de la generacio de Kato la Olda (234-149 a.K.) devis batali kontraŭ la opinion, ke nur la helena povas esti kulturlingvo, instrumento de supera kulturo, ne ankaŭ la latina.

Ĉi-momente efikas kontraŭ Esperanto ne nur la sama antaŭjuĝo, kiun alfrontis ĉiuj lingvoj dum la epoko pli aŭ malpli longa, en kiu ili devis montriĝi - kaj montriĝis - esprimkapablaj kaj praktikeblaj en la plej diversaj vivosferoj. Efikas kontraŭ Esperanto ankaŭ la supra kaj danĝera impresio, ke iu nacia lingvo - ekz. la angla - povus solvi la problemon de la interkomunikado.

Tre pragmatikaj kapoj akceptas senpripense lingvon al ili tuj alportantan profiton. Sed ilia etperspektivo ne rajtas konkeri niajn spiritojn. Nu, oni plue uzu la anglan, la germanan, la francan ktp. laŭ diversaj hodiaŭaj bezonoj, sed **la funkcioj de internacia lingvo estas aliaj**, kaj ilin ne povas realigi iu nacia lingvo. Kontraŭ Esperanto efikas ankaŭ ĝuste la jus diskutita koncepto pri "artefariteco". Ankaŭ ĉi tie la plej multaj homoj pensas nescience, senrigore, spontane, triviale, ĉar la vorto **artefarita** devenas el la latina **artifex** (majstra). Ĝuste tiu **homo artifex** (la majstra homo) kreis la tutan civilizitecon: **ĝi estas artefarita**, ne natura, do ne simple aperinta sur la kampoj kaj montoj.

La naturo donis kavernojn, ne domojn, ĝi donis felojn, ne vestaĵojn; natura varmo venas de suno, de vulkanoj, de bestaj korpoj, ne de varmoradiiloj; natura lumo venas de astroj, de fulmoj, ne de la lampoj. Ĉu la flugado estas "natura" por la homo? Ĉu la malnovaj primitivaj vilaĝoj, spontane ekaperintaj, estas pli racie aranĝitaj ol la modernaj laŭplane kreitaj urboj? Ĉu la spontanaj valoj, kurbiĝintaj laŭ akcidentaj terenaj kondiĉoj estas pli funkcioj ol la modernaj kanaloj?

Ĉion kion ni vidas ĉirkaŭ ni kiel kulturajn kaj civilizaciajn atingajojn kreis la **homo artifex**; eĉ la bela kaj bonodora rozo ne estas hodiaŭ "natura", ĝi estas rezulto de pluraj miksaĵoj artefarite realigitaj fare la homo. Do, la ordinara parolanto ofte intermiksas la kulturologian gravan sencan de **artefariteco** kun la banala senco de tiu koncepto, kaj tuj konkludas ke "artefarita lingvo" povas esti nur surogato, samkiel la artefaritaj floroj kompare al la naturaj.

6. Esperanto kiel alternativo

En la problemo de internacia komunikado aperas diversaj faktoroj - politikaj, ekonomiaj, lingvistikaj kaj multaj aliaj. Ĉiu havas apartan pezon. Laŭ fizikaj leĝoj ili devus doni paralelogramon de la fortoj, kies komponantoj rezultigas vektoron nomita rezultanto, kiu koincidas kun neniŭ el la komponantaj fortoj. Transmetita en nian problemon, la fizika leĝo decidas: **nova forto, neŭtrala!** La socio tamen ne estas tiom justa kiom la naturo; ĉi tie rolas nemezureblaj faktoroj, historiaj, subjektivaj k.s.

Naskiĝis jena situacio: La teoriaj, raciaj, logikaj konsideroj diras NE al iu ajn nacia lingvo kiel unusola interkultura vehiklo, tamen la historia racio, pragmatika, akceptas senpripense iun solvon tuj portantan kelkajn materiajn avantaĝojn. Tia solvo jam kreis proprajn strukturojn, kiuj per dialektika procezo plifortigas siavice la propran solvon. Ankaŭ tiu ĉi situacio havas korespondanton en fiziko. La germana sciencisto *Hermann Haken* (en siaj laboraĵoj pri sinerĝetiko) montris, ke fasko de radioj unuiĝas certamomente spontane ĉirkaŭ unu radio, kiu do determinas la direkton de la fasko. Restas la demando, ĉu la faskoj arigiĝas ĉirkaŭ unu inicia radio aŭ ankaŭ tiu ĉi ŝanĝis sian lokon iomete, do la faskoj unuiĝis pro certaj kialoj - sed neniŭ el ili restis senmova, ĉiopova. Ĉiukaze la konsciaj fenomenoj diferencas de la meĥanikaj, tial la Biblia Davido venkis la gigantitan Goliaton, kvankam, laŭ fizikaj leĝoj, la multe pli forta Goliato devintus venki.

Revenante al nia afero, oni povas konstati, ke en diplomatio, en komputiloj, en diversaj industriaj kaj komercaj entreprenoj estas hodiaŭ la angla plej multe praktikata. Siavice tiuj strukturoj plue propagandas por la angla, ĉar ĝi donas al ili tujan profiton. Por ŝanĝi tiun direkton necesas grandaj fortostreĉoj, decidoj de superaj instancoj, naciaj kaj internaciaj. Ĉu la sinjoroj sidantaj en tiuj internaciaj instancoj, kie ili estas pli ol bonege pagataj - ĝuste ĉar ili regas unu aŭ alian nacian lingvon - estas vere interesitaj al demokratia solvo, kiu forprenos de ili la grandegajn profitojn?

Popola proverbo konsilas, ne demandi la virkapron ĉu ĝi bonvolas forlasi la ĝardenon! Ankaŭ la firmaoj produktantaj komputilojn, kaj la utiligantoj de komputiloj ne estas pretaj forviŝi la ĝisnunajn programojn kaj tuj krei novajn programojn surbaze de Esperanto. Ankaŭ kelkaj naturaj sciencoj jam utiligas la anglan en siaj kongresoj kaj laboraĵoj. Do, ne estas realisme postuli radikalan turniĝon de la situ-

acio, nome anstataŭi la "mondlingvojn" (la angla, germana, franca, hispana, rusa) per Esperanto, en diplomatio k.t.p. kiel fakte postulas la racio. Kion do fari?

Ni revenu al la demandoj starigitaj de *La Société Internationale de Linguistique Fonctionnelle*. Inter ili superregas la demando: Kiu alternativo al la angla? Mi proponis respondon - kiun mi skizis antaŭnelonge dum la kunveno de pedagogiaj kibernetikistoj en Berlino: Ĉar la angla ĉi-momente estas nek tute evitebla nek kiel sola vehiklo akceptebla, ni memoru pri kulturhistoria situacio dum la mezepoko, nome, tiutempe en pluraj partoj de la terglobo funkciis paralele du lingvoj: en Okcident-Eŭropo la latina, en (sud)Orient-Eŭropo la malnovslava kiel vehiklo en filozofio, historio, eklezio, scienco, oficialaj dokumentoj ktp. sed paralele funkciis la evoluantaj naciaj lingvoj.

En Grekujo same funkciis kaj la malnova, prestiĝa lingvo helena, kaj la nov-greka, vivanta, aktuala, popola, nuntempa; en Ĉinio funkciis paralele dum longa tempo du paralelaj kulturlingvoj - kun beletraĵoj, publikigaĵoj k.s. unu malnova, tradicia, alie "nova", demokratia. Finfine en ĉiuj tiuj kazoj estis adoptita la demokratia solvo, sed, kompreneble, tio ne okazis sen teoriaj konfrontiĝoj, en kiuj la demokratia solvo (lingvo) estis mallaŭdata kiel lingvo de nekultivitaj kamparanoj kaj ŝafistoj, de la "almozuloj en la foiroj", kiel povra idiomo nekapabla iam esprimi la filozofiajn, sciencajn, religiajn konceptojn.

Sciate, tio ripetiĝas hodiaŭ (ankoraŭ) en la aroganta, senkonscia sinteno kontraŭ Esperanto, kvankam jam miloj, dekmiloj da verkoj ĉiujfakaj konas Esperanton kiel sukcesan ilian vehiklon - ĉu tradukitaj en Esperanton, ĉu originale verkitaj en tiu ĉi lingvo. Konsiderante la nekredeble kompleksan internacilingvan problemaron, estas hodiaŭ necese, realisme, el politika, ekonomia, psiko-pedagogia, kultura kaj aliaj vidpunktoj, utiligi la kulturhistorian sugeston kaj **imagi por Eŭropa Unio paralelan du-ebenan lingvosistemon**, nome, **trilingvismo: germana/franca/angla** por iuj agadsferoj - ekzemple en diplomatio, sciencoj (precipe en pozitivaj, naturaj teknikaj) kaj **du-lingvismo: nacia lingvo/Esperanto** por aliaj agadsferoj: vojaĝo, trafiko, medicina kuracado, gastronomio, diversaj servoj, sporto k.a.

La ideo, inspirita de kolonialismo, enkonduki la anglan en ĉiugradajn lernejojn de Eŭropo estas nerealisma en la moderna mondo, kun pli aŭ malpli egalrajtaj ŝtatoj; ĝi estus ruiniga por la ceteraj lingvoj kaj kulturoj tiele reduktitaj al "provincaj" idiomoj; ĝi estus dan-

ĝera eĉ por la paca atmosfero, ĉar naskiĝos la kutimaj malamo kaj malamikeco kontraŭ la hegemoniistoj. Kompreneble, la paralela sistemo ne havu rigidajn limojn, ne konos malpermesojn. La lingvoj restas *de jure* egalaj, t.e. **nenia hegemonio**. Ĉiuj artaj, kulturaj, sciencaj forumoj samkiel ĉiuj personoj - laŭ propraj bontrovoj kaj profesiaj interesoj - povus praktiki iu ajn lingvon, kio principe validos por ĉiuj vivosferoj. Eble tiu ĉi ideo ne estas la plej bona; eble la praktiko kaj la pensado trovos pli bonan, sed temas finfine pri necesaj alternativoj.

7. Kelkaj demandoj stariĝas antaŭ niaj pensoj kaj koroj

Ĉu la supre skizitaj faktoj ne estas komponantoj de racia, demokratia, morale valida mondo, en kiu la estonta generacio, la postaj generacioj deziras vivi? Ĉu ne estas granda idealo ke - samkiel en la nunaj Esperantaj internaciaj aranĝoj - la homoj de diversaj landoj, kulturoj, filozofioj, konfesioj, profesioj parolu senĝene inter si kiel kun la propraj parencoj kaj amikoj? Ĉu ne estas unika, nova, plurflanke grava idealo, ke la gestudentoj povu legi en originalo post unu tago interesan libron aperintan hieraŭ ie en la mondo? Ke la turisto povu interkompreniĝi kun instancoj, kuracistoj, policianoj k.t.p. senpere en ĉiu lando de la mondo?

Ĉu estas racie ke la instrukcioj por uzi medikamentojn estu skribitaj en kvar aŭ kvin aŭ pli da lingvoj? Ke la pasportoj por la civitanoj de Eŭropa Unio estu skribitaj en dek lingvoj? Ke la dokumentoj de la internaciaj organizaĵoj estu tradukitaj en ses, sep aŭ plurajn lingvojn, kio kostas (inkluzive la salajroj de la lingva personaro) milionojn da dolaroj ĉiujare, dum interne ĉiu ŝtato volas ŝpari monon kaj, en la mondo, milionoj da homoj malsatas?

Antaŭ kelkaj, ĉirkaŭ 30 jaroj aviadilo kun pli ol 200 pasaĝeroj faris katstrofan akcidenton, ĉar la piloto de nacio A ne komprenis la komandon en la angla lingvo veninta de la flughaveno de nacio B, kaj en la Hindia Oceano pro ŝiprompo okazis tragedio, ĉar sur la ŝipo troviĝis vojaĝantoj el 12 nacioj, kaj pro la diverslingveco la komandanto ne povis doni la komandojn por saviĝo! Ĉu tiuj fenomenoj ne meritas nian sindonemon? Ĉu estas banala revo, ke la popoloj diskutu pri diversaj aferoj en reciproka respekto kaj egaleco, sidante vere ĉe ronda tablo intelekta? Esperanto jam eniris delonge en la reton de moderna informado tutmonda. Kial ne uzi tiun eblecon?

Ĉu tiuj idealoj ne rajtas konkeri la animojn, korojn kaj kreivkapablojn de niaj nuntempaj gejunuloj? Ĉu do ne estas provo de grandanimeco, de racieco kaj vera demokratieco praktiki, disvastigi, apogi la internacian lingvon Esperanto? Niaj poresperantaj argumentoj estas nerefuteblaj. Ĉemane kun tiaj argumentoj, la kontraŭuloj de Esperanto ŝajnas antaŭ bone preparita esperantisto kiel boksisto de kategorio plumpeza antaŭ boksisto de peza kategorio. Paradoxse, tamen multaj esperantistoj anstataŭ kuraĝe, digne, science, malkovri la veron de Esperanto al la homoj, kapablas nur murmuri sub la tablo, kvazaŭ ili hontas pri siaj konvinkoj.

Ne ĉemizoj kun verdaj steloj, ne demonstracio de dek personoj, ne "Esperanto" sur la saketoj por aĉeti legomojn en foiroj estas la necesaj hodiaŭaj agoj favore al Esperanto. La moderna homo bezonas argumentojn prestiĝe prezentitajn, precipe fare de intelektuloj, ĉar, laŭ malnova observo, ne estas la samo se du diras la samon. Jen agadkampo por la diligenta, entuziasma studentaro!

La gejunuloj estas kapablaj je kuraĝo, sindonemo, pasia defendado de la vero kaj justo, tial la junuloj estis ĉiam avangardo de grandaj ideoj, ili sciis ke la ĉielo estas atingebla per la mano, ke malkuraĝo, pesimismo, etspiritaj okupoj, indiferenteco por la destino de ideoj havas ĉiam ion tragikan, ion kontraŭhoman; ke la vivo sen agadoj por altaj celoj estas malbela, vakua, mizera, limigita al manĝado kaj trinkado - ju pli multe des pli bone - kaj en tia vivo ofte trovas lokon diversaj malvirtoj neniantaj la korpon kaj animon.

Hodiaŭ oni aŭskultas tro da ideologiaj mensogoj, oni vidas kaj legas malnoblajn, oni trovas "krizojn" sur ĉiuj vojoj, faladojn en absurdajn sektajn, en alkoholismon aŭ drogojn, ĉar mankas al la junaj homoj idealoj. Mi ne asertas, ke Esperanto estas nepre la plej grava celo de la nuno; mi asertas nur, ke la internacia lingvo havas hodiaŭ la strukturon kaj la sorton de nuntempaj idealoj, pri kiu multaj homoj ankoraŭ "silentas en ĉiuj lingvoj", kvankam ili estas plurflanke interesitaj al tiu ĉi problemo.

La demando estas, ĉu la junuloj de la nuna generacio akceptos la maljustaĵojn diverstipajn en la hodiaŭa mondo. Kaj kiom longe? Mi scias el miaj ĉirkaŭ 60-jara sperto kun la gejunuloj diversnaciaj, ke ankaŭ en la nuntempa junularo ardas la deziro kaj la sopiro pri bono, belo kaj justo. Mi certas ke la puraj animoj de la gejunuloj malakceptas la pigrecon de penso kaj la mistifikon de la veroj. Mi scias, ke ili estas pretaj je faroj.

En la vivo, en la beletro, en teatro kaj filmo vi ofte povis vidi kiom multe valoras en la homa vivo la **faro**, la ago. Ne "la vorto" staris ĉe komence sed la **faro**. Sen bonfaroj la vortoj restas sapvezikoj, la vivo de homo ne havas propran vojon, kaj estas puŝita de ĉiuj ventoj. Batalanta verkisto *Maxim Gorki* (1868-1936) diris, ke la homoj aŭ ardas aŭ putriĝas.

Alia rusa verkisto, *N. Gogol* (1809-1852) prezentis en sia fama verko "Mortaj Animoj" inter multaj aliaj la figuron de *Koroboĉka*, virino el la tiama feŭdala Rusio. Tiu virino kredis sin kvazaŭ sankta, ĉar ŝi rabis nenion de neniu, eĉ insekton ŝi ne ĝenis, nenies ombron forprenis, vizitis regule la preĝejon, kisis ikonojn, arde preĝis al Dio. Tamen, la aŭtoro ironias ŝin, kondamnas ŝin samkiel la ruzan *Ĉiĉikov*, ĉar ŝi neniun bonfaron faris, neniam al aliuloj pensis, poste ŝi restos nenio en la ĉirakŭajo, eĉ ombro de bonfaro ne. Fakte ŝi ne devintus ekzisti, konkludas la aŭtoro.

Mia celo dum la hodiaŭa interparolado ne estis "argumenti por Esperanto". Tio estus multe pli ampleksa ŝarĝo. Mi nur intencis, preni el la poresperanta argumentado kelkajn aspektojn, kiuj povus miaopinie montri kiel gestudentoj okupiĝu pri la internacia lingvo kaj kiel, kompreneble, ili unue devas lerni Esperanton, por bone konscii, pri kio temas. Fine sed ne laste por jam ĝui la Esperantan etoson, la amikecon kun la homoj diversrasaj, diverskredaj, diverslingvaj en internaciaj Esperanto-renkontiĝoj, kiuj estas mikromodeloj de la ebla homa kunekzistado.

Referencoj

(1) Por la esploroj ĝis 1972 vd. *Ivo Lapenna, Ulrich Lins & Tazio Carlevaro*: "Esperanto en perspektivo", UEA, 1974. Centro de esploro kaj dokumentado pri la monda lingvo-problemo, *London-Rotterdam*.

Multnombraj studoj aperis post 1972; ampleksan informon pri gravaj kontribuoj donas la laboraĵoj de *Detlev Blanke* "Plansprache und Nationalsprache": *Einige Probleme der Wortbildung des Esperanto und des Deutschen in konfrontativer Darstellung*, Berlin 1981. "Internationale Plansprachen" *Eine Einführung*, Berlin 1985 k.a.

Vidu ankaŭ *Benoit Phillipe "Sprachwandel bei einer Plansprache am Beispiel des Esperanto"*, Konstanz, 1991

(2) vd. ekz. Esperanto? Eldiroj de eminentaj polaj intelektuloj. Intervjuis kaj la enkondukon aldonis *Walerian Wludarczyk, Warszawa, 1964, I. Dratwer "Pri internacia Lingvo dum jarcentoj"*, Telavivo, 1977.

(3) *Ulrich Lins "La danĝera lingvo"*. Studo pri la persekutoj kontraŭ Esperanto, Moskvo, 1988

(4) La malnovslava (aŭ "slavona", "la eklezia slava") funkciis dum la mezepoko en sud-orient-Eŭropaj landoj kiel vehikla lingvo en ekleziaj verkoj, en diplomatio, en oficialaj dokumentoj. Kiom forte kaj neracie povas roli la tradicio montras la fakto, ke la malnovslava estis ankoraŭ utiligata en preĝejoj di-servoj, kvankam la popoloj mem ne plu komprenas ĝin, kaj la Biblio jam delonge konsilas ke "pli validas tri konataj vortoj ol mil nekonataj".

Adreso de la aŭtoro

Prof. Ignat F. BOCIORT
Wustrower Str. 1
DE - 13051 - Berlin
 GERMANIO

Priaŭtora informo

Post studado de filozofio kaj filologio, Prof. *Bociort* instruis lingvon kaj literaturon, inkluzive kulturfilozofion kaj literaturan estetikon, en la Universitatoj de *Bucuresti, Timișoara* kaj *Berlin* (gastdocento 1965-1970).

Prof. *Bociort* estis prezidanto kaj nun honora prezidanto de Rumana Esperanto-Asocio (REA), kaj ankaŭ honora membro de Universala Esperanto-Asocio (UEA).

Kvazaŭ recenzo

Kion pastro *KNEIPP* diris en sia libro "Tiel vi vivu"

Rüdiger SACHS

Post referenco al la 180-jara naskiĝdatreveno kaj mencio de la memkuracado de juna Sebastjano Knajpo* per sia malvarmakva metodo en SR 3/2001⁽²⁾ venis legantoleteraj demandoj pri mia opinio de la Knajpa terapio ĝenerale. Ho ve, mi estas bestkuracisto, ne kuracisto por homoj, kaj tial por tiuspeca respondo tute ne kompetenta - kvankam mi laboris preskaŭ 25 jarojn kadre de la (hom)medicina tropika instituto de Hamburgo. Sed ankaŭ mi sufiĉe ofte prenas - post frumatnaj kurado kaj gimnastiko - la ŝancon, uzi la survojan Knajpan "piedbanan kuvon" konstruitan de la loka *Kneipp*-asocio, kaj aplikas malvarmakvan terapion laŭ la reguloj de la famkonata sanmetodinstrua pastro.

Sed fakte, kiel estro de la medicina-biologia sekcio de Akademia Internacia de la Sciencoj (AIS) San Marino, mi antaŭnelonge estis petata, enkonduki naturmedicinan kurson de kolegino *Lewanderska-Quednau* dum la 18-a Pola studsesio de AIS en *Bydgosz* / Pollando. Kompreneble mi estis preta, fari tion, kaj decidis, altiri la intereson de la ĉeestantoj de la naturterapia praktiko per kelkaj vortoj el la enkonduko de la Knajpa libro "**Tiel vi vivu**" (*Kneipp*, 1889) - do el libro eldonita 2 jaroj post la apero de la unua Zamenhofa lernolibro de Esperanto

Mi resumos tie ĉi la el la ĵus menciita libro prenitajn "enkondukajn vortojn" kaj kompletigos ilin per antaŭ kvin jaroj farita traduko de ĉapitro pri "ĝusta mezuro ĉe la manĝado" el la sama Knajpa libro fare de Rikardo ŜULCO kaj kunaŭtoroj (1997).

* *Sebastian KNEIPP* (1821-1897); germana pastro kaj naturkuracisto, kiu propagande disvastigis hidroterapion - antaŭ ĉio iri nudpiede sur malseka herbejo kaj sin fortike hardadi per malvarmakvo-verŝoj.